

Heinrich Neye,  
Gaja kajto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Mi havis kajton iam  
el bunta bril-paper'.  
Gajige estis, kiam  
ĝi flugis tra l' aer'.

Post ĝia start' subite  
rapidis supren ĝi;  
entuziasmigite  
ĉielen strebis mi.

Jen super nia domo  
eĉ flugis gaje ĝi,  
kaj ĝojis ĉiu homo  
vidante tiun ĉi.

Luliĝis ĝi envente,  
malsupren vidis ĝi,  
rigardis ĝi silente  
sur tiun mondo ĉi.

Nun jena temp' pasinta  
delonge estas for;  
la kajto leviĝinta  
vidiĝas en memor'.

*Traduko de la Germana poemo "Fröhlicher Drachen" de HEINRICH NEYE (\*1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2001-12.*

*MR-373-1 / Arg-105-212 (2006-01-23 09:56:44)*

*La origina germanalingva versio de tiu ĉi poemo aperis en 2001-10-18 en la germana agronomia revuo "Landwirtschaftliches Wochenblatt" (Postfach 4929, D-48028 Münster, Germanio, tel. +49-(0)251-51012-24 aŭ +49-(0)251-51012-35, ret-adreso: redaktion@wochenblatt.com, retejo: www.wochenblatt.com ).*